

August Heinrich Hoffmann,

August Heinrich Hoffmann,

August Heinrich Hoffmann,

Abendlied

Vespera kanto

Vespera kanto

*tradukita de Manfredo Ratis-
lavo**tradukita de Manfred Retzlaff**tradukita de Manfred Retzlaff*

Nun vesper' fariĝas
 Ree tie ĉi,
 Paco subeniĝas
 Kaj ripozas ni.

Surkampare iĝas
 ree nun vesper',
 milde subeniĝas
 paco de l' eter'.

Ree vesperiĝas
 ĉie en la rond',
 paco subeniĝas
 kaj ripozas mond'.

Rivereto fluas
 Ĉe la roko sen
 Ĉeso kaj ĝi bruas
 Plu kaj plue jen.

Nur de l' roko bruas
 rivereta flu',
 kaj la akvo fluas
 ĉiam ĉiam plu.

Riveret' nur fluas
 ĉe la roko jen,
 kaj ĝi daŭre bruas
 plu kaj plu sen ĝen'.

Sonoril' neniŭ
 Ripozigas ĝin,
 Ne dormigas iu
 Ĝin je l' tagofin'.

Ne haltigas iu
 ĝin je l' tagofin',
 kaj vesper' neniŭ
 ripozigas ĝin.

Ne vespero iu
 endormigas ĝin,
 sonoril' neniŭ
 je la tago-fin'.

Tia, mia koro,
 Estas ankaŭ vi.
 Donu, ho Sinjoro,
 Pacon vi al ĝi.

Mia kor', senlace
 strebas ankaŭ vi,
 vi ripozos pace,
 nur se volos Di'.

Mia koro, tia
 estas ankaŭ vi!
 Pacon trovos mia
 koro nur en Di'.

...

...

...

Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (*Hoffmann von Fallersleben*, *1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (*Manfred Retzlaff*, *Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio*, *1938-11-04) en 2012-11.

Arg-645-1378 (2012-11-27 18:34:25)

Vidu ankaŭ: [http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_\(Fallersleben\)](http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_(Fallersleben)). La muziknotoj troviĝas en http://www.lieder-archiv.de/abend_wird_es_wieder-notenblatt_300026.html, la melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.

Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (*Hoffmann von Fallersleben*, *1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1988-04-16.

MR-212.1 / Arg-645-1302 (2012-11-04 23:01:54)

Pri la aŭtoro vidu la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben. La melodion verkitan de Christian R. Rinck oni povas aŭdi en <http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/abendwir.html>. Pri la komponisto rigardu: http://de.wikisource.org/wiki/ADB:Rinck,_Johann_Christian_Heinrich.

Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (*Hoffmann von Fallersleben*, *1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2013-01-27.

Arg-645-1943 (2014-01-28 23:29:57)

La melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.